[noto] fonto: "La Esperanta Verkaro de Ŝibajama Zenkei" (1978, JBLE)

# *La Budho kaj Darmo*

**Ŝibajama Zenkei**

**1**

*"Die geisterwelt ist nichit verschlossen.*
*Dein sinn ist zu, dein herz ist tot!"*

Supre citita estas parentezo en mondfama verko "Faust" verkita de Germana majstro Goethe. La parentezon, mi opinias, oni povas parafraze kompreni jene:

"La spirita mondo neniam estas fermita,
sed fermita ja estas via animokulo."

Kiel valora kaj aŭskultinda! La vortoj ne nur estas atente aŭskultinda al tiuj, kiuj volas eniri en religion, aŭ kiuj nun vivas religie, sed al ĉiuj por ke ili povu sin introspekti.

Ĉu oni malfermas siajn okulojn? Se jes, ĉu la okuloj estas justaj kaj senpartiaj? Se ili estas vualitaj de nebuleto, oni ne povas aserti, ke ili estas justaj, senpartiaj aŭ klaraj. Rigardante per tiaj okuloj nacion kaj socion, se oni kuraĝas diri, ke ni povis rigardi ilin juste, granda ja estas eraro. Sekve la kritikoj provitaj en tia rigardo ankaŭ devas esti maljustaj. Vere, havi justan vidpunkton kaj provi konvinkan kritikon, estas eble nur al tiuj , kiuj havas serenajn penetremajn okulojn, sed absolute ne eble al tiuj , kiuj havas ĥaosan cerbon aŭ nebuliĝintajn okulojn.

Jen pro tio la Budho Ŝakjamunio admonis al siaj adeptoj, "Vidu juste, pripensu juste." Tamen tio estas esperebla nur al la unua, sed ne al la lasta, kiu havas okulojn kovritajn per partia maljusteco.

Tial se oni volas vidi juste kaj pripensi juste, antaŭ ĉio devas akiri justan vidpunkton, forigante nebulecon de siaj animokuloj. Nur por tio "La vojo de Lumiĝo" estas predikita de la Budho.

Kio do estas la vojo predikita, kaj la metodo montrita?

Jes, ĉiuj instruoj de la Budho estas nenio alia ol repondo al la demando.

**2**

Esence, Budhismo ne estas religio tiel nomata; ĝi enhavas aŭ filozofion aŭ moralon aŭ religion aŭ arton ktp., resume tiu, kiu sinteze enhavas ĉiujn flankojn de la homa vivo, estas instruo de Budhismo. Estas prave, ke oni nomas tripitakon "granda fonto de orienta kulturo." Se oni frapos, jen malfermiĝos la pordo de vero, se oni serĉos, jen aperos diversaj trezoroj laŭvole, tiaj estas la tripitakoj. Malgraŭ tio, ke ili estas tiel unika fonto de orienta kulturo, kaj granda provizejo de tutmondo, la esplorado estas limigita je religia, filozofia, morala kaj belarta sfero, kaj ankoraŭ ne atingis aliajn restantajn. Tial mi esperas, ke oni komencu esplori ilin de diversaj vidpunktoj, kaj malfermu la trezorejon tiel unikan,......nu, mi devas reteni min al la temo.

Kaj en Budhismo ĉiujn, kiuj estas konservataj en la trezorejo, resume oni nomas "Darmo"; materio kaj spirito, kosmo kaj vivo, moralo kaj politiko, ktp. estas prezentataj nur per tiu ĉi vorto "Darmo". Sekve la signifo de Darmo estas diversspeca kaj neniam estas difinita. Laŭ la okazo respektiva ĝi signifas aŭ Veron, aŭ normon, aŭ instruon, aŭ

substancon, aŭ fenomenon kaj en unu okazo signifas Dion en religio, tamen en alia okazo signifas nian percepton.

Kial ĝi havas tiel diversajn signifojn? Tio ja devenas de la afero, ke la instruo de la Budho ne estas limigita nur je religia flanko. Nu, tamen estas treege malfacile, ke oni juste vidi kaj juste kritiki tian Darmon nedifinitan, sed laŭ la plenumiĝo de tiel malfacila afero, oni povas decidi sian teniĝon al la kosmo aŭ la vivo kaj aliflanke klare perceptiĝas valoro kaj realeco de ĉiuj Darmoj. Samtempe foriginte ĉiujn iluziojn ĝisnunajn al Ĝi, oni povas malkovri al si la veran valoron kun lumo de subjektiva percepto kaj objektiva realeco.

Resume dirate, kaŭze de la justa intuicio de Darmo, subjektive justiĝas al ni la animokulo kaj montriĝas vizaĝo kontraŭ vizaĝo la nobla vidaĵo de la spirita mondo, objektive sin prezentas la valoro kaj realeco de ĉiuj Darmoj. Kaj ni klare sciiĝas, ke ili respektive valorigas nin mem.

Jen, tiam funkcias justaj sentoj kaj emocioj, kiuj konsekvence devas ekmoviĝi; nome tio montriĝas unuflanke kiel dankemeco al ĉiuj estaĵoj, kaj aliflanke kiel gvid-agado al la liberiĝo de diversaj suferoj de aliuloj. Ĉio ĉi tio ja estas la kialo enkalkuli kompaton kaj saĝon kiel spirito de Budho, kaj akcenti la kvar votojn kiel la unuan mision de bodisatvo (la kvar votoj estas kvar ĉene koncernantaj agoj, kiujn ĉiuj mahajanaj budhanoj devas vote plenumi ne nur por si mem, sed pli por alia.)

Budho estas perfekta posedanto de la kompato kaj la saĝo, tial lia fundamenta deveno senescepte estas la enkorpiĝo de Darmo el la kompato kaj la saĝo. Se tiel, la lumiĝo de la Budho estas la enkorpiĝo de Darmo, kaj Lia kompato kaj la saĝo estas produktaĵoj kiel ĝia frukto. Tial same, havi "justan vidon aŭ justan pripenson" ankaŭ estas eble nur al tiuj, kiuj estas enkorpiĝinto de Darmo.

La signifo de jenaj vortoj, kiujn diris la Budho, ankaŭ montras la saman ideon.

"Kiu vidas darmon, tiu vidas Min!

Kiu vidas min, tiu vidas Darmon." Kaj la signifo de jenaj vortoj, kiujn diris la Budho por la unua fojo post sia liberiĝo: "Mi estas Budho, mi estas saĝulo, mi estas superinto el ĉiuj." ankaŭ devas esti komprenata, mi opinias. Kaj samtempe oni povas konvinkiĝi, ke tio ĉi estas vera senco de la plej altaj vortoj en Budhismo.

"Nirvano, Bodhio, Liberiĝo, La unua principo, k.t.p." ankaŭ havas fundamenton en la afero. Tial la enkorpiĝo de Darmo devas havi la plej gravan signifon kaj taskon en iu ajn religio, estante la necesa motivo fundamenta, ĉe kiu oni povas ŝanĝi suferon al ĝuo, mortemon al eterno, maljuston al justo, malsaĝon al saĝo, ktp.

Interalie en Budhismo ĝi estas nepra radikala bazo, kaj la instruo de Budhismo disvolviĝas de la bazo kiel sia centro. Konsekvence la studado de Budhismo devas havi sian centron ankaŭ en ĝi. Sekve esplorado de la enkorpiĝo de Darmo, dirante en ĝenerala signifo devas esti esplorado de tuta Budhismo, kaj devas esti esplorado de ĉiuj sutroj. Sed ĉi tie mi ne povas temi tian vastan, do mi tion devas cedi kun bedaŭro, kaj nun rekte provos priskribi pri la Lumiĝo de la Budho, t.e. pri enkorpiĝo de Darmo de la Budho.

**3**

La Budho, kiu enkorpiĝis Darmon, rigardis tutan aĵaron tre intime kaj freŝe, kaj reale perceptis, reale gustumis iliajn sencon kaj valoron kiel ili estas. Kaj trovinte la vojon senŝanĝan inter kvar suferoj en nia vivo (naskiĝo, maljuniĝo, malsano kaj morto). Li trankvile tenadis sin en nobla korstato de la Nirvano, ĉiam pura kaj agrabla. De tiam antaŭ

liaj okuloj , ĉiuj sin prezentis tre vivecaj, ĉiuj fariĝis al li lumantaj estaĵoj. Post tiel admirinda reviviĝo la Budho vivadis trankvile en la sankta korstato, demetinte tutan nebulon en sia animokulo.

Do, per kia metodo Li atingis tiun noblegan staton?

Ĉu Li atingis laŭ la graco de Dio, kiel en aliaj religioj? Aŭ ĉu Li povis akiri sian liberiĝon kiel favoraĵon de Dio? Ne, la Budho neis tian estaĵon nomatan "Dio", kaj samtempe preĝon al Dio, malakceptis kiel bigotan superstiĉon. Ĉu Li do atingis per iu alia inspiro mistika? Ne, tion Li ankaŭ rifuzis. Krome, Li averte diris, ke samkiel ebrieco pro alkoholaĵo, tio neniam donas lumon eternan, kaj ke tiaj neniel povas fariĝi gvidantoj konduki justan vojon en la vivo, nek povas percepti la veron de universo.

Tial la lumiĝo de la Budho havas grandan diferencon kun la saviĝo en la aliaj religioj. Sekve oni povas aserti, ke la karakterizaĵo de Budhismo estas nur en tio.

Se tiel, kion do signifas la liberiĝo de Budho? Oni diras lumiĝon, tamen, kio estas la lumiĝo, kion Li akiris al si?

Kompreneble tio devas esti nenio alia ol "enkorpiĝo de darmo", kaj alivorte, tio ja estas nenio alia ol klara malfermiĝo de animokulo, pri kiu diras majstro Goethe. Sekve tio povus esti mistika kaj racia, sed samtempe devas esti nemistika kaj racia. En sankta skribo Lotusfloro de l' Mirinda Darmo estas prezentata, kiel malfermi saĝecan vidpovon de budho. Nome ĉar malfermiĝis la okulo subjektiva, jen konsekvence prezentiĝis la vero objektiva. Jam estas senbezone diri, ke darmo, havante nenian diferencon kaj koncernante neniom al estado aŭ neestado de budhoj, nek al lumiĝo aŭ suferado de homoj, ĉiam majeste troviĝas kiel ĝi estas.

Se oni malfermas la animokulon, nur per kiu oni povas juste percepti darmon, ĉe la sama momento en ĝi speguliĝas darmo.

Tial lumiĝo ne estas objektiva problemo, sed absolute estas subjektiva. Kaj alivorte povas diri, ke foriginte privatan kaj iluzian nebulon, Li akiris justan vidpovon abnegacian kaj seniluzian.

Interrilato de lumiĝo kun iluzio povas diri tiun de lumo kun mallumo, sekve "akirinte lumiĝon, oni forigas iluzion", kaj "foriginte iluzion, oni akiras lumiĝon" estas identa en rezulto.

La afero tamen estas esprimita de filozofia vidpunkto de Mahajana Budhismo kiel tre mistika kaj mirinda. Sed estas facile supozeble, ke oni tion esprimis kiel mirindan fenomenon, ĉar, kiu enkorpigis al si la animon abnegacian kaj absolute egalan, devas esti tiu animo mem. Ke memo percepti memon, nature entenas mistikan signifon per si mem, mi opinias. Estas certe, ke de tiu kialo troviĝas la filozofia esprimo, sed resume tio devas esti nur "Enkorpiĝo de Darmo".

Kaj vera mirindeco de la enkorpiĝo de darmo estas severa fakto, ke estas permesate sperti ĝin nur al enkorpiĝinto mem. Tial se oni volas reale sperti veran korstaton de la lumiĝo de la Budho, oni povas ĝin sperti tiam, kiam li aŭ ŝi mem povos fariĝi tia enkorpiĝinto.

## 4

La religia cirkonstanco de Ŝakjamunio kompreneble estis bramanismo, en kiu Li naskiĝis, kreskis, studadis, laŭ kies instruo Li plenumis religian asketadon.

Lia asketado, tamen, ne havis celon al la sperto de la asketo mem, sed al liberiĝo de suferoj en nia vivo. Tial, post la asketado daŭrigita dum ses jaroj, per subita turniĝo Li decide forĵetis la asketan vivon, dirante, ke tio ja neniom helpas marŝadon sur la vojo eniri en la liberiĝon.

Kaj sin baninte en la rivero Nirenĵana, Li purigis sian tutan korpon, kaj kun la sento nova kaj freŝa aranĝis per molaj herboj sian sidejon sub la bodhiarbo, densege kreskanta.

"Ĝis kiam mi povos sin liberigi, mi ne lasos min iri for de la sidejo", kun tiel firma konfido kaj granda kuraĝo Li komencis vivi en plena meditado.

La priskribo konkeri diversajn diablojn, troviĝanta en Lia mita historio, evidente estas arta kaj drama esprimo de la korstato kruele batalanta al si en la koro per sia tuta forto dum la meditado. La fakto, tamen, ŝajnas al mi pli mizera kaj intensa, ol la priskribo.

Kredeble, tiam al Li svarmis multe da iluzioj kiel persistaj diabloj. Ju pli profunde Li meditadis, des pli akre atakis Lin la diablaj pensoj. Li tamen ree kaj ree kuraĝigis sin, kaj per pafarko de prava penso kun sagoj de penego sin ĵetadis al la diabloj: en originon de memo Li profunde fosis kaj fosadis sian animon.

Kaj finfine, ĉe la momento, kiam Li ekvidis brilantan stelon en la ĉielo tagiĝanta, la 8an de decembro, subite atingis la grandan lumiĝon, certiginte al si la fonton, el kiu elfluadas diversaj iluzioj kaj malŝatindaĵoj de homa korpo.

Jen, Li perfektigis al si la saĝon, plene enkorpigis la darmon.

De antaŭ longa tempo oni diras pri la lumiĝo de la Budho. "Li sola lumiĝis sen gvidanto."

Vere, por atingi al si la lumiĝon la Budho havis nenian gvidanton, nek amikon, aŭ nek Dion kredindan. Jes Li ja atingis nur per sia propra klopodego kun granda kuraĝo.